

## Interna komunikado

Karaj kunklubanoj,

salutas vin Klaus Leith.

Kiam Harald volas sciigi pri klubaj aferoj, li ĝis nun skribas retleteron al la klubanoj. Eblas respondi lian mesaĝon retpoŝte, kaj se pri la respondo li ankaŭ volas sciigi la aliajn, li povas plusendi ĝin retpoŝte al ĉiuj klubanoj. Philip Vormbrock metas kopiojn de la mesaĝoj al la klubanoj (post forigo de personaj detaloj, retpoŝtadreso ktp.) en nian novan publike alireblan retpaĝon, kiun li prizorgas, vidu <http://kek.w4f.eu/Webseite/eo/Klub-Mitteilungen.html>.

Tio estas iom peza procedo kaj speciale **retletera diskuto** inter la klubanoj malfacilas.

## Avantaĝoj de interna reta diskutgrupo

La komunikadon plifaciligus reta diskutgrupo, speciale nuntempe dum la pandemio, kiam “normalaj” klubvesperoj ne eblas:

- ĉiu ano de la diskutgrupo tuj ricevas ĉiujn mesaĝojn senditajn al la diskutgrupo
- ĉiu ano povas respondi mesaĝon (laŭvole nur al la sendinto aŭ al ĉiuj)
- ĉiu ano povas informi pri alia temo sub alia titolo (nova "diskutfadeno")
- ĉiuj mesaĝoj estas afiŝitaj en la interna retpaĝo de la diskutgrupo, kie ili daŭre restas konsulteblaj
- ne necesas pritrakti la mesaĝojn (forigi personajn detalojn) antaŭ la enarkivigo, ĉar la diskutgrupo estas fermita kaj ĝian retpaĝon nur povas aliri aliĝintaj, registritaj klubanoj, ne eksteruloj; krome la retpoŝtadreso de la sendinto ne aperas en afiŝitaj mesaĝoj, se la sendinta grupano unufoje elektis anstataŭigan uzantnomon.

Komuniki sen perdi la superrigardon do eblas multe pli facile en reta diskutgrupo.

Por vidi ekzemplon de funkcia diskutgrupo, rigardu la publike alireblan, malfermitan grupon <https://groups.io/g/germano> (tie alklaku "Messages" en la supra, maldekstra parto de la paĝo).

## **Kiel procedi?**

Mi proponas uzi retan diskutgrupon, por kiu uzeblas la retservo **groups.io**.

La bazaj funkcioj, kiujn ni bezonas, estas senkostaj, kaj multaj (publikaj) esperantistaj diskutgrupoj jam ekzistas tie. Ni nur uzos nepublikan, fermitan diskutgrupon. Tiam diskutgrupon mi, Klaus Leith, provcele starigis.

Vi ricevos invitilon, kiu ebligas vin aliĝi al la diskutgrupo. Se vi preferas **ne** aliĝi, bv. informi Harald, tiukaze li plue sendos rekte al vi siajn klubajn mesaĝojn en la kutima maniero. Eventualajn respondojn aŭ diskuton en la diskutgrupo vi tiukaze ne povos sekvi, ĉar vi ne membras en la diskutgrupo kaj do ne ricevos en via retpoŝtkesto aliajn diskutgrupajn mesaĝojn, kiujn ne sendis Harald je la ĝisnuna maniero.

La invito, kiun vi baldaŭ retletere ricevos, tekstas:

\*\*\*\*\*

***Ni invitas vin aliĝi al la diskutgrupo de la Kolonja Esperanto-Klubo.***

***Por aliĝo, vi devas respondi ĉi tiun mesaĝon!***

\*\*\*\*\*

Vi nur devas alklaki la butonon "Antworten" en via retpoŝtumilo sen skribi ion ajn.

Vi ricevos konfirmon de via aliĝo post pritrakto far la prizorganto de la diskutgrupo (Klaus Leith).

Se vi havas demandojn aŭ hezitas aliĝi, bv. skribi al la prizorganto, uzante la retadreson [kek+owner@groups.io](mailto:kek+owner@groups.io)

Se vi volas ricevi la mesaĝojn de la diskutgrupo je **alia** retpoŝtadreso ol la kutima, al kiu estis adresita la invito, sendu mesaĝon al la prizorganto de la diskutgrupo: [kek+owner@groups.io](mailto:kek+owner@groups.io). Vi ricevos novan invitilon je via alternativa adreso.

Post ricevo de via respondo al la invito, la prizorganto registras vin kiel ano de la diskutgrupo. Vi ricevos konfirman mesaĝon pri tio. Ekde nun vi ricevos mesaĝojn senditajn al la diskutgrupo rekte je via retpoŝtadreso. Viaj respondoj al mesaĝoj estas sendataj aŭ al la tuta diskutgrupo, aŭ nur al la sendinto, laŭ via elekto; vidu la fikcian ekzemplon de mesaĝo en nia diskutgrupo (KEK):

[kek] fikcia mesaĝo

---

De: "fikcia\_grupano" <xyz@poŝtservo.eo>  
Al: kek@groups.io  
Dato: 17.12.2020 19:22:06

Karaj geamikoj,  
[...]  
Korajn salutojn,  
fikcia\_grupano

---

Groups.io Links:

You receive all messages sent to this group.

[View/Reply Online \(#47\)](#) | [Reply To Group](#) | [Reply To Sender](#) | [Mute This Topic](#) | [New Topic](#)

[Your Subscription](#) | [Contact Group Owner](#) | [Unsubscribe](#) [xyz@poŝtservo.eo] \_.\_.\_.\_.\_

---

En la suba parto de la mesaĝo ("Groups . io Links") videblas la opcioj por reago (ĉagrenige, la uzanta fasado de groups.io estas nur anglalingva, kaj ni ne eblas ŝanĝi la tekston):

- **Reply To Group**: sendas la respondon **al ĉiuj** anoj de la diskutgrupo kaj **afiŝas ĝin** en la diskutgrupa retpaĝo
- **Reply To Sender**: sendas la respondon **nur** al la sendinto kaj **ne afiŝas ĝin** en la diskutgrupa retpaĝo

### Reta aliro al la diskutgrupo

Nia diskutgrupo havas la retadreson <http://groups.io/g/kek>. Ĉar ĝi estas fermita grupo, ĝian retpaĝon povas nur eniri aliĝintaj klubanoj, registritaj de la prizorganto de la diskutgrupo.

Por uzi la retan aliron al iu grupo ene de la servo groups.io, necesas registriĝi je groups.io. Tio ne estas deviga, se vi volas nur retroŝte sekvi ĉiujn mesaĝojn kaj sendi respondojn aŭ aliajn mesaĝojn. Tamen: La reta aliro havas la avantaĝon, ke vi povas vidi ĉiujn afiŝitajn mesaĝojn iam senditajn, kiuj aperas ordigitaj laŭ temoj (titoloj de la mesaĝoj). Tio multe faciligas la superrigardon por uzantoj kaj longdaŭran diskutadon.

Vi povas jam elprovi registriĝi en groups.io kaj tiamaniere aliri al nia diskutgrupo. Se tio malfacilas, sendu viajn demandojn al [kek+owner@groups.io](mailto:kek+owner@groups.io) por havigi helpon, aŭ atendu pli detalajn indikojn, kiujn mi sendos fine de la jaro/komence de januaro.

### **Fina peto**

Nun la diskutgrupo havas nur unu prizorganton (mi), sed laŭeble ni havu almenaŭ du. Kiu volontulas? Ne temas pri multa aŭ daŭra laboro, sed sporadaj mastrumaj taskoj. Plej bone, ke ne ĉio dependu de nur unu persono.

Amike,

Klaus